**MARIANA** *(Marijana, kroata kanto)*

    D
1. Estis, estis bela maja nokto,
                        A      A7              D
    Mariana volis veni al nia rendevu'.
                    G                          D
Rf: /:Ho, Mariana, dolĉa eta Mariana,
                  A              A7              D
     atendos mi nun vin ĝis frumaten':/.

2. Pasis, pasis jam la noktomezo,
    Mariana ne alvenis al nia rendevu'. Rf

3. Vane, vane floras majaj floroj,
   Mariana ne alvenis al nia rendevu'.Rf

**Ruĝa valo** *(Red River Valley, en la ĉeĥa traduko Červená řeka, usona tradicia kanto, tradukis Josef Cink)*

```
    C                      C7           F
1. Baldaŭ vi Ruĝan Valon forlasos,
               C                      G      (G7)
    baldaŭ via belec' estos for,
          C           C7         F
    via ĉarma rideto forpasos,
             C             G7        C
    rememor' pri vi iĝos dolor'.
```

2. Antaŭ tempo mi volis diveni
   la sekreton de via pupil',
   nun esperon mi vidas malveni,
   post montaron for ĝis mejloj mil.

3. Haltu por adiaŭi momenton,
   ne rapidu al longa la voj',
   lasos ĉe multaj vi tristan senton,
   ankaŭ mi dronos en la malĝoj'.

4. Foje voku pri mi rememoron,
   rememoron pri la Ruĝa Val',
   eble temp' en mi kovros doloron,
   sed memor' pri vi restos sen pal'.

**Vojzorgista kanto** *(franca tradicia kanto Le cantonnier /Sur la route de Louviers, en la ĉeĥa traduko Cestářská /Na silnic do Prášil)*

```
        G           D(7) G                C      G
1. /: Sur ŝoseo al Pariz' vivis juna vojfarist':/.

/:A: Martelis li, B: Martelis li,

   A:Martelis li, B:Martelis li
                             D                D7                  G
   Martelis li sur voja gruz', por ke taŭgu voj' por uz':/.
```

2. /:Orkaleŝa sinjorin' ĉe labor' ekvidis lin:/.
   /:A: Ho vojzorgist', B: Ho vojzorgist',
      A: Ho vojzorgist', B: Ho vojzorgist',
      Ho vojzorgist' ŝi diris do, peno via pezas tro:/.

3. /:Li respondas kun sincer', sinjorino, estas ver':/.
   /:A: Se povus mi B: laŭ moŝtsinjor'
      A: Se povus mi B: laŭ moŝtsinjor'
      sidi ja en kaleŝ' el or', mi ne penus en labor':/.

**Al kastelo celas vojo** *(Na Okoř je cesta)*
*ĉeĥa vakera kanto de nekonata origino,*
*tradukis Josef Cink*

     C                                         G7
1. Al kastelo celas vojo, kiu belas pro aleo

    de la sorp', (de la sorp').
    C
    Sur la voj' mi iras, pri ripoz' deziras
    G7                      C          C7
    tre lacega en la korp'.
     F                      C             D7                    G7
    Fine de la longa kruta voj' staras la restoraci'.
     C                                          G7                     C
    Aro de vagantoj, tie en la kantoj vokis kun la emoci'.

Refreno:
C                          G7
Ne plu timigas nin la blanka fantomin'
C                    G7             C
el kastel' jam lumo estas for.
                               G7
Se ŝi ĉiam laŭ kutim' pelis ege al la tim'
C                       G7            C       C7
homojn dum la noktomeza hor'.
F                       C
La kastelon prisieĝis nun
D7                           G7
da vagantoj granda ar', granda ar',
C                                 G7
kaj la blanka fantomin' kun la ĉef' amuzis sin,
C                   G7          C
tutan nokton en la solidar'.

2. Foje kiel ŝtormo flugis la informo
pri la rabo en kastel', (en kastel').
Duba jen afero, ĉu ĝi estas vero,
aŭ ĝi estas nur fabel'.
Ĉefo ludis kartojn en la kel'
kun la blanka fantomin'.
Li ne staris garde, sed per kisoj arde
li sen zorg' regalis ŝin.

Refreno